

Redakta noto

Tiu ĉi SR estas la lasta kajero de la jarkolekto 2007 de Scienc Revuo kaj samtempe kompletigas la vicon de entute ses festkajeroj kun prelegoj kaj kontribuoj okaze de la centjariĝo de ISAE en julio 2006. La sekva SR 1/2008 estos ree “normala Scienc Revuo” kun – krom originalaj artikoloj – sciencaj eĉaĵoj (al multaj legantoj ili mankas), legantoleteroj (kiuj amasiĝas) kaj libro-recenzoj (kies kontribuantoj atendas publikiĝon). Certe enestis en la unua(j) sciencrevua(j) numero(j) de 2008 ankaŭ la prelegoj faritaj dum la centjariĝjubilea konferenco la 24-an ĝis 28-an de julio pasintjare en la Esperanto-Kasteleto en Tavoleto/Italujo, kies aŭtoroj bezonis iom da tempo por skriboforme finpretigi siajn kontribuojn.

Oni ja povas (kaj rajtas) demandi, kial tiom multaj festkajeraj artikoloj – 27 kontribuoj sur 280 paĝoj en la ĉi-jara SR-volumo 58, kaj pluaj 12 artikoloj en SR 3/2006 kaj SR 4/2006 sur 128 paĝoj en la antaŭa Vol. 57 – ne estis eldonitaj kiel “jubilea libro centjariĝfesta” (same kiel prof. Paul Neergaard eldonis la libron “Sciencaj Studoj” okaze de la 50-a datreveno de ISAE) aŭ kial ne aperis pluraj (fest)-kajeroj, eble 6 aŭ 7, dum la jubilea jaro mem. Nu, 1) la jarkolektoj de Scienc Revuo ekde 2000 konsistas el po kvar kajeroj, kaj stabilecon en ties eldonado mi konsideris pli grava ol okaza plialtiĝo de la eldonoj “jubile-okaze”; 2) la eldono de (fest)libro estas temporaba kaj kosta afero – la “Sciencaj Studoj” okaze de la 50-jariĝfesta en 1956 aperis nur en 1958, do du jarojn post la jubileo mem; 3) libroformo sendube valoras por unutama fak-specialaĵo, sed ne por diversfaka prelegkolektaĵo; por tiu pli taŭgas vico da sciencrevuaj kajeroj; 4) Scienc Revuo estas en prezokadro, kiun ĉiuj sciencamantoj povas permesi al si – ankaŭ por malpli riĉaj landoj aŭ studenta poŝmono; 5) Scienc Revuo post sia nun preskaŭ 60-jara ekzistado ekde 1949 – kaj precipe post la bedaŭrinda malapero de multaj sciencaj revuoj sekve la falon de la fera kurteno inter oriento kaj okcidento – forte celas stabiligi la eblon por internacilingvaj aŭtoroj publikigi en bibliografie facile atingebla kaj en Esperantujo konata fakrevuo, kiu samtempe estas klare aranĝita kaj superrigardebla fonto por originalaj sciencaj artikoloj.

Por konkondi la sekvavolumajn SR-kajerojn mi invitas la fidelajn aŭtorojn kaj legantojn de Scienc Revuo, kaj ankaŭ la estraranojn kaj komitatanojn de ISAE, doni (laŭ la ĝisnuna “redakta noto”) siajn opiniojn pri kaj ideojn por la postcentjariĝa prospero de ISAE kaj regula apero de Scienc Revuo kun kontribuoj de kompetentuloj el ĉiuj sciencaj fakkampoj.

Prof. d-ro Rüdiger Sachs, prezidanto de ISAE

Disvastiĝado de la “zum-muŝo” *Chrysomya albiceps* en direkto for de la ekvatoro al ambaŭ polusoj

Oldřich Arnošt FISCHER



Resumo

La “zum-muŝo” *Chrysomya albiceps* WIEDEMANN, 1819 (*Diptera: Calliphoridae*) disvastiĝis en la dudeka jarcento el tropikaj kaj subtropikaj trovlokoj de Afriko kaj Azio en zonojn kun modera klimato de Eŭropo kaj suda Ameriko. En Eŭropo ĝi jam transpaŝis 50° de norda latitudo (Ukrainio). En Ĉeĥio ĝi estis kaptita plej norde en la vilaĝo Visky (49°32' de norda latitudo, altitudo 415 m). En suda Ameriko ĝi transpaŝis 40° de suda latitudo (Argentino). La zum-muŝo estas nova membro de la mezeŭropa faŭno. Ĝi estas utila por juĝa entomologio kaj havas sanitaran signifon. Influo sur indiĝena mezeŭropa faŭno de dipteroj kaj kaŭzado de mijozoj ĝis nun ne estis observitaj en Eŭropo.

Enkonduko

Muŝoj de la familio *Calliphoridae*, la “zum-muŝoj”, estas grava grupo de dipteraj insektoj (*Diptera*). Kelkaj zum-muŝoj estas nur sendanĝeraj saprofagoj, kiuj helpas al malkomponiĝo de mortaj korpoj (Fischer 2005), aŭ ili parazitigas de vermoj kaj aliaj senvertebruloj (Větráček 1991). Sanitaran signifon havas sinantropaj (t.e. kunvivanta kun homoj) specioj, kiuj povas transmisi kaŭzantojn de infektaj kaj parazitaj malsanoj de homoj kaj bestoj (*Paraluppi* k.a. 1996, Oliveira k.a. 2002, Maldonado & Centeno 2003, Holešovská k.a. 2004) aŭ kaŭzi mijozojn, t.e. parazitajn evoluojn de muŝlarvoj en vivantaj vertebruloj (Hall & Wall 1995).

Larvoj de la zum-muŝoj, kiuj evoluas en kadavroj aŭ forĵetaĵoj amasiĝas botulinon (toksinon de bakterio *Clostridium botulinum*). Ili povas kaŭzi veneniĝon de birdoj, kiuj ilin voregas (Hubálek & Halouzka 1991, Böhnelt 2002). La zum-muŝo *Chrysomya albiceps* estas meze granda muŝo, proksimume kiel hejma muŝo *Musca domestica*.